# La Voĉo de Amikejo

Informilo pri **Senlime** kaj **Esperanto** en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

**Senlime**
Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française

**En cas de non-distribution, renvoyer à**
H. Lentzen
Feldweg 20
BE-4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26
E-mail : lentzen@senlime.org

**Editeur responsable**
**Responsa eldonanto +**
**Informoj en la franca lingvo:**
Tel. +32-(0)87/33.02.92
GSM +32-486-947.957
Mail: jacques@senlime.org
Esperantista Grupo de Verviers
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters
BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands**
**Informoj en la nederlanda:**
Tel. xx-31-(0)43-455.14.36
Mail: parren@senlime.org
P.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch**
**Informoj en la germana:**
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@senlime.org
K. Hogen, Auf der Pief 22
DE-52134 HERZOGENRATH

**Aperas kvarfoje en jaro kaj rete elŝuteblas ĉe www.senlime.org**

**Prezoj por BE, NL kaj DE :**
**Unuopa n-ro : 4 EUR**
**Jara abono : 12 EUR**

Bonvolu pagi, prefere antaŭ la jarfino, **NUR** al la konto :
**979-5327148-10**
IBAN : BE41 9795 3271 4810
BIC : ARSPBE22
(banque : Argenta)
de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

La jara kotizo al ***Senlime*** (10 €) estas disigita de la abono al la papera versio de nia informilo (12€).

## ENHAVO :

**p. 1 : Reveno al Amikejo**
**p. 2 : Niaj programeroj lupee**
**p. 3 : Eŭregiona kalendaro 2012-2013 (2/2)**
**p. 4 : Novaĵoj pri Amikejo kaj EMRo**
**p. 5 : Sugestopedio**
**p. 6 : Verviersa angulo : suggestopédie**

## Reveno al la Amikejo !

Laŭstatute, la asocio ***Senlime*** celas plifortigi la interpopolan interkomprenigon helpe de la internacia lingvo esperanto, precipe en la ***Euregiono Mozo-Rejno***.

Pro manko da (homaj) fortoj, rapide evidentiĝis, ke la agado de ***Senlime***, ĉefe organizita ĉirkaŭ la esperantista grupo de Verviers (Belgio), devus limiĝi al pli malgranda teritorio : la iama Neŭtrala Moresnet (***Amikejo***) nune Kelmis… kaj (tamen plue Verviers !).

Se la fina celo estas difinita supre de la statutoj, la asocio strategie elektis peran celon: igi el **Kelmiso esperanto-urbo**n, kio kompreneble unue postulas aprobon de la loka enloĝantaro.

Dum la nunaj monatoj, kiel montras la enhavo de tiu-ĉi informilo, ni konkrete paŝas al tiu direkto: pluraj reklam-agadoj en la leterskatoloj de Kelmis kaj per la masmedioj, interesaj kunven-programoj, interalie baldaŭ projekciado de la filmo «The Universal language»,…

Hazarde (chu ?) ni ricevis neesperitan helpon de eksteraj esperantistoj : JEFO, kiu decidis organizi sian jaran muzik-festivalon (**FESTO**) en Kelmis. Post pli ol cent jaroj, unuafoje denove loĝos multaj esperantistoj (inter kiuj multaj junuloj) en Amikejo kaj tion kelkaj Kelmis-anoj ŝajne atendis kaj nepre rimarkos.

Ni ne tro esperu sed tenu nin pretaj por ĉia sekvo: eĉ esperanto-kursoj en Kelmiso estas planitaj. Ĉu per sugestopedia metodo ? Ni tion pripensu…

# Niaj programeroj lupee

***detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,…***

## Ĝenarala asembleo

Vi estas invitataj ĉeesti la ĝeneralan asembleon de E.G.V kaj ***Senlime***, okazonta en B-Kelmis (Select, Lutticherstr. 264), la 20an de septembro, de la 20a ĝis la 22a horo kun jena tagordo:

- oficialigo de la membro-listo
- starigo de la ĉeestantara listo
- kontrolo de la mandatoj
- raporto de la ĝenerala sekretario
- raporto de la kasisto
- jura aprobo de la komitato
- estonta agado de Senlime/EGV
- (re)elekto de la komitatanoj
- diversaĵoj

Ni rememorigas al vi ke nur kotizinta membro rajtas voĉdoni kaj kandidatiĝi kiel komitatano.

Membro kotizinta kaj malhelpata ĉeesti rajtas doni skribitan mandaton al alia persono.

Ĉia temo povos estis pritraktita fine de la asembleo, post aŭ kadre de la «diversaĵoj» sed la ĝenerala sekretario rajtas mallongigi la debatojn pro manko da tempo.

Bonvenon al ĉiuj !

La registro enhavanta la oficialajn dokumentojn de ***Senlime*** kaj E.G.V. estos konsultebla de la (kotizintaj) membroj en la sidejo de la asocio ***Senlime***, str. J. Wauters 5, BE-4800 VERVIERS

**09-20** 20h00 BE-Kelmis, Select: ***Ĝeneralaj asembleoj de Senlime kaj E.G.V.***

Inf. jacques@senlime.org

## La universala lingvo

Post mallonga periodo da nur 125 jaroj, esperanto nun estas unu el la 100 plej uzataj lingvoj, inter la 6.800 idiomoj parolataj tra la mondo. Temas ja nun pri «universala lingvo».

"***La Universala Lingvo***" estas nova dokumenta filmo de Oskar-premia nomumito Sam **Green**. La 30-minuta filmo kaj spuras la historion de Esperanto kaj estas portreto de la hodiaŭa Esperanto-movado. En ĉi-tiu pionira filmo pri nia lingvo, **Green** kunplektas intervjuojn kaj portretojn kiujn li filmis ĉe pluraj lastatempaj Universalaj Kongresoj kun trezoro da neniam viditaj arĥivaj bildoj pri **Zamenhof** kaj la frua Esperanto-movado.

La filmo ankaŭ enhavas intervjuojn de Humphrey **Tonkin**, Arika **Okrent** kaj multaj aliaj. "*Mi spektis **La Universalan Lingvon** kun granda plezuro kaj esperas, ke ĝi sukcesos kiel ĝi meritas.*" diris Renato **Corsetti**. "*Kelkaj homoj en Kopenhago sin esprimis, ke oni devintus fari pli propagandecan filmon. Ili ne komprenas, ke objektiva filmo estas pli forta.*"

Post la «**FESTO 2013**» en Kelmis, ***Senlime*** volas «enbati la najlon», prezentante tiun filmon per germanlingvaj surtekstoj al la loka enloĝantaro ne-esperantista.

**10-18** 20h00 BE-Kelmis, «***The Universal language***» (film-projkciado kaj debato).

Inf. jacques@senlime.org

## La franca, stulta lingvo

Didier **Lousberg** kiel multaj el ni lernis esperanton jam en sia junaĝo kaj poste iĝis instruisto. Post kelkaj jaroj «en politiko», li retrovis la lernejon kaj nun instruas (do, ankaŭ la francan) en Verviers-a unuagrada lernejo.

Alfrontante multajn nebelgajn infanojn, li konstatis ilian malfacilecon lerni nian lingvon. Li zorgeme klopodis faciligi ilian laboron, laŭeble – por komenci - reduktante la malfacilecon de la lingvo.

Li tiam alvenis al la konkludo, ke li iom post iom estis ekkreanta kvazaŭ-artefaritan francan… iom similan al esperanto. Sed kial rekonstrui esperanton ?

Ofte li ridigis nin per rimarkoj koncerne la strangaĵojn de la franca. Ĉi-vespere li iele sintez-igos siajn ideojn… kaj konkludos.

**05-17** 20h00 BE-Kelmis, Select: "***La franca, stulta lingvo***", prelego de Didier **Lousberg**.
Inf. lousberg@senlime.org

<u>**Zamenhof-festo**</u> ĉi-jare verŝajne okazos nek en Verviers nek en Kelmis: unu jaron el du ***Senlime*** grupe vojaĝu (trajne aŭ kunveturante) al aliurba grupo…

**12-20** Zamenhof-festo
(loko, dato kaj horo proponotaj).

Inf. jacques@senlime.org

# ESPERANTO✪

## Eŭregiona kalendaro 2012-2013 (2/2)

***Senlime*** publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de ***Senlime***. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de ***Senlime*** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kultur-centro "Select", Lutticherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro : Jean-Marie **Jacques** (jacques@senlime.org).

**07-19** Feria fermo de la Select (komitata kunveno en Verviers).

**08-16** 20h00 BE-Kelmis, Patronage : **FESTO 2013**, muzika festivalo organizita kunlabore kun EUROKKA, okazos de la 11-a ĝis 18-a de aŭgusto (koncertoj, k.t.p.).
Inf. jacques@senlime.org

**09-20** 20h00 BE-Kelmis, Select: konversacia tablo kaj ĝeneralaj asembleoj.
Inf. jacques@senlime.org

**10-18** 20h00 BE-Kelmis, Select: "La Universala lingvo", filmo de **Sam Green**.
Inf. jacques@senlime.org

**11-15** 20h00 BE-Kelmis, Select: "La franca, stulta lingvo", prelego de Didier **Lousberg**.
Inf. lousberg@senlime.org

**12-20** Zamenhof-festo (loko, dato kaj horo proponotaj).
Inf. jacques@senlime.org

✪

Pliaj kunvenoj okazos en Kelmis (Select) ek de la 15-a de marto, ĉiun trian vendredon de la monato je la 20a horo (informoj en nia sekvonta trimonata informilo).
Inf. jacques@senlime.org

**19-07** Congés annuels au Select (réunion du comité à Verviers).

**16-08** 20h00 BE-Kelmis, Patronage: **FESTO 2013,** festival musical organisé en collaboration avec l'association de musique rock EUROKKA, du 11 au 18 août (concerts, etc.).
Inf. jacques@senlime.org

**20-09** 20h00 BE-Kelmis, Select: table de conversation et assemblées générales.
Inf. jacques@senlime.org

**18-10** 20h00 BE-Kelmis, Select: "The universal language", film de **Sam Green**.
Inf. jacques@senlime.org

**15-11** 20h00 BE-Kelmis, Select: "Le français, langue idiote", conférence de Didier **Lousberg**.
Inf. lousberg@senlime.org

**20-12** fête Zamenhof (lieu, date et heure à proposer…).
Inf. jacques@senlime.org

✪

D'autres réunions auront lieu à La Calamine (Select) à partir du 15 mars, chaque troisième vendredi du mois à 20 heures (informations dans notre prochain bulletin trimestriel).
Inf. jacques@senlime.org

# Novaĵoj pri KELMIS-AMIKEJ✪

(el la ret-informilo de la Yahoo-Grupo «***Amikejo***»)

**Valona marko pri kvalito**

La 27an de majo, reprezentanto de la valona ministro pri Turismo, Paŭlo FURLAN, disdonis la unuajn valonajn markojn pri kvalito «Wallonie Destination Qualité». Inter la 88 laŭreatoj, la feri-loĝejoj de Ŝevemonto en Hombourg/Plombieres)...

Bonega informo por ni ĉar sufiĉe malfacilas trovi bonajn loĝejojn apud ***Amikejo***. Transe de la kvalita marko, la elektito sin devigas al kritika atento pri sia oferto kaj promesas pristudi siajn plibonigajn eblecojn.

Vidu la trilingvan (sed ve -jam?- ne esperantlingvan) ttt-ejon ĉe: http://www.gitedechevemont.be/

**Plombimonto *"havas faŭkon"***

Tiu vortludo (faŭko, «Gueule» en la franca, estas la nomo de loka rivero sed estas ankaŭ slange uzita por signifi mienon, «*stilon*» aŭ «*look*»!)…

Do, Plombimonto havas faŭkon, kaj kaj tio estis eĉ pli vera precize la 30an de junio, okaze de la 15a okazigo de la **Festo en la Parko** organizita de la ASPC "Promotion de Plombières-Village" [plifamigo de la Plombimonta Vilaĝo].

Tiun komplete senpagan rendevuon oni ĉiam organizas je la somera solstico, dum la St-Johano-festo.

Kaj tio, de post kiam la iama minejo borde de la rivero "Gueule" iĝis natura konservejo, kun taŭgaranĝo de la komunuma parko, kreado de Domo pri la minejo orkestrita en interpretan centron pri la pasinto kaj nuntempo de Plombimonto, signalizitaj promenadoj, panorama belvidejo supre de la «truo» de la Gueule (tie, kie la rivero sin ĵetas sub la monton kerne de la protektitejo), realigaĵoj faritaj dank'al la civita agado de la organizanta ASPC por malhelpi la detruon de tiu urba havo.

**Plia karaokeo de *Senlime***

Pro la memdecidita emeritiĝo de la reĝo Alberto la 2a, Belgio nun havas novan reĝon: Filipo la 1a.

Ni deziras bonan regnon al li kaj okaze de la samtempa reĝiniĝo de lia edzino, la iama princino ***Matilda***, ***Senlime*** verkis novan karaokeon: "*Valsigante Matildan*" :-).

Fakte temas pri plia karaokea versio de popolkanto kiu estas tiel ŝatata en Australio ke multaj tie dezirus, ke ĝi iĝu la nacia himno!

Alia esperanto-versio de la kanto kun la sur-ekranaj literoj jam antaŭe troveblis ĉe youtube.

La muziko, aranĝita de Kristina **Macpherson**, baziĝas sur tradicia popola melodio.

Kiel kutime mi mem ludis la arion per mia sintezilo kaj karaokeigis la tuton en dosieron "MATILD_J.kar" kiun vi eventuale senpage elŝutu el la dosierujo "Fichiers" de la yahoo-grupo ***Amikejo***.

**Festo 2013**

***Festo***, la ĉiujara muzikfestivalo por esperantistoj, organizita de **JEFO** kunlabore kun **EUROKKA** kaj belgaj esperantistoj okazis en Kelmis (Patronage) de la 11-a ĝis 18-a de aŭgusto kun la kutima sukceso (kun siaj koncertoj mem-kompreneble, sed ankaŭ prelegoj ekskursoj, k.t.p.).

**Kelmis, esperanto-urbo**

***Senlime*** ne forgesas sian peran celon - igi el Kelmiso esperanto-urbon - kio kompreneble unue postulas aprobon de la loka enloĝantaro.

Kaj tio ne estas evidenta ĉar la epoko de Amikejo kaj esperanto en Kelmis jam estas fora… Sed kompense, la urbo pli kaj pli internaciiĝas: ĉeestas ne nur germanlingvanoj, sed ankaŭ franclingvanoj, germanoj (iamaj Akenanoj k.t.p.), iamaj nederland-(lingv)anoj kaj eĉ pli kaj pli mult-nombraj rifuĝintoj el foraj landoj.

Okaze de nia feria kunveno de julio (nia kunvenejo en Select estante fermita pro la ferioj) ni (duan fojon) disdonis milon da flugfolietoj pri esperanto (kaj FESTO 2013) en la leterskatoloj de Kelmis (centro).

Ni daŭrigos nian kampanjon dum septembro-oktobro, anoncante per tria flugfolieta disdono (kaj laŭeble la masmedioj) projekciadon de la filmo «The Universal Language».

Jean-Marie **Jacques**,
ĝenerala sekretario.

# Sugestopedio,

## aktivigo de la rezervaj kapabloj de la kursanoj

*Mia opinio estas ke oni lernas kiam oni sentas ke oni havas sukceson, ĉar nenio sukcesas tiom bone kiel sukceso.*

La sugestopedia sistemo, konceptita de Georgo **Lozanov**, kuracisto kaj psikoterapiisto en Bulgario, klopodas konsideri ĉiujn faktorojn kiuj plifaciligas la lernadon kaj sistemigon.

Laŭ mia kompreno, sugestopedio temas pri kvar fundamentaj principoj:
1. Ĉio devas esti pozitiva, inklude ankaŭ la erarojn : kiam la lernantoj eraras ili fakte lernas ion novan.
2. Enigi la saman informon kaj en la mallongtempan kaj en la longtempan memoron, en la sama tempo kaj la tuta teorio de sugestopedio baziĝas je donado de intensaj kaj malintensaj informoj, en la sama tempo, tiumaniere, ke la lernantoj ne forgesu ilin post kvar tagoj.
3. Oni ŝajne memoras multe pli kiam emocia signifo aldoniĝas al ĉiu informo.
4. Antaŭ ol oni analizas, oni asimiligas: kiam oni jam rekonis ion, estas pli facile kaj pli plezurige analizi ĝin.

**Kaj kiel tio aspektas en la praktiko?**

La lernantoj havas tekston, kiun plej ofte la instruisto mem verkas por ili. La kialo, pro kiu oni uzas speciale verkitajn tekstojn estas, ke oni volas eviti la negativajn sugestojn kaj koncentriĝi je pozitivaj situacioj en kiuj la lernantoj povas senti sin sekuraj, povas malfermiĝi, preni defiojn kaj certiĝi ke ili neniam estas en danĝero.

**La dekkvar karakteroj kaj la lernantoj** (1): ĉiu el ili prenas unu el la roloj de la dek-kvar karakteroj.

Ĉiu leciono komenciĝas per la antaŭludo, kiam la instruisto antaŭinstruas ĉion, kion oni poste lernos.

Tion sekvas la koncertlegado, kiam la instruisto laŭtlegas la tekston aŭdigante en la fono klasikan muzikon.

Tiun ĉi laŭtlegadon sekvas la dekodiga parto, kiam la instruisto donas multajn "memorhelpilojn" /"azenpontojn" ; tiel la lernantoj memoros preskaŭ ĉion helpe de mallongaj anekdotoj kaj rakontoj.

Post tio venas serio de rapidmovaj aktivaĵoj kiuj povas esti ludoj, pilko- kaj kartludoj, ŝercoj, mallongaj skeĉoj, malgrandaj konkuroj, ĉiuspecaj aferoj, poemetoj, movigaj ludoj kiuj plisolidigas ĉion kion ni lernis pere de la tekstoj.

Post tio ni havas malstreĉigan koncerton, kiam ni uzas barokan muzikon, malfrubarokan muzikon, komponitaj plejparte inter la 1600-1650-aj jaroj kaj tio portos la lernantojn en la staton de malstreĉiĝo. Tio estas aparte utila por alpreni grandan kvanton de informoj.

La instruisto estas la perceptiga inĝeniero, la "arkitekto de la medio" kie la lernantoj lernas tra la propraj lernostrategioj, inter kiuj dominas la vid-impresoj:
- Tiuj kiuj lernas ĉefe vide ricevas multajn vid-stimulaĵojn
- Tiuj kiuj plej bone lernas laŭ aŭdo, lernos per siaj oreloj, ja estas ankaŭ sufiĉe da aŭdaj stimulaĵoj, ĝuste tio estas la esenco.
- Tiuj kiuj lernas pere de movoj, havas multe da ebloj por moviĝi, tiel ke ankaŭ ili povu lerni.

**Nun ni rigardu la klasĉambron.**

Ĝi certe ne aspektas tiel kiel ordinara klasĉambro. La gravecon de la estetiko de la sugestopedia klasĉambro ne eblas subtaksi.

Lastatempa esploro montris, ke en ajna komuniksituacio, la ĝeneralan impreson formas nur 7 %-e la diritaĵoj ; 38 % de la informoj venas de la korpolingvo, vizaĝesprimoj kaj de aliaj ne-vortaj komunikadoj kaj 45 % estas la kunteksto.

Ĉar sugestopedia metodo estas kreaĵo de medio kie la lernantoj povas malkovri siajn fortojn por progresi, la klasĉambro devas esti respegulaĵo de iliaj plej grandaj aspiroj.

Lonny **Gold**
Tradukis Petra Smidéliusz.

La supra teksto estas la sonbendo de youtube-filmeto el : http://www.youtube.com/watch?feature=player_embedded&v=givFrb4Jt-k

(1) Ĉiu leciona teksto formas teatraĵan scenon – neatendite longan – kun 14 roloj : ĉiu el la 14 lernantoj povas fiere ludi kiun ajn rolon (kvankam tiuj-ĉi prezentas malsamajn karakterojn): temas ekz-e pri kuracisto, profesoro, urbestro, advokato,…

# Verviersa Angulo

## Verviersa Esperanto Grupo

**Comité de V.E.G.**

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.20.30

Secrétaire: J.M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

Association pour l'Espéranto (A.P.E.)
Secrétaire : Claude GLADY
Rue du Culot, 1
5630 CERFONTAINE
Tél. 071 644 916 cglady@arcadis.be

**Cotisations**

Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant chaque année leur(s) cotisation(s) au compte

**979-5327148-10**
IBAN : BE41 9795 3271 4810
BIC : ARSPBE22
(banque : Argenta)

de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

*Ce bulletin d'information est également intégré à la revue de A.P.E. («Espéranto en marche») dans laquelle vous trouverez les montants des abonnements et cotisations à APE et/ou UEA.*

*La cotisation pour **Senlime** reste fixée à **10 Euros**.*

**Indiquez les nom, prénom et domicile du membre cotisant ainsi que le motif du paiement:**
***«cotisation de.... pour....».***

**D'avance, merci à tous !**

# *Suggestopédie*

## Activation des réserves humaines des élèves

- Après tant d'années au lycée, je suis incapable de me commander une tasse de thé à Londres.
- J'ai déjà dépensé un argent fou avec toutes ces méthodes et je ne parle toujours pas l'anglais. D'ailleurs je déteste cette langue !
- L'anglais ! Quel cauchemar ! Pour le lire, je n'ai aucun problème. Mais dès qu'il s'agit de parler, j'ai une boule dans la gorge, c'est l'angoisse.
- Aidez-moi ! Dites-moi comment faire ! Si je ne parle pas l'anglais dans deux mois, je n'aurai pas ma promotion !

Chaque année, à la rentrée, le professeur de langues pour adultes entend de telles remarques de personnes venant de milieux professionnels les plus divers… et elles ne se limitent pas à l'anglais !

La suggestopédie est une méthode d'enseignement qui a été élaborée par le Dr Lozanov, médecin et psychothérapeute bulgare, à partir des premiers travaux sur la mémoire, et repose sur 20 ans de recherches et d'expériences scientifiques. Elle a par la suite été officiellement appliquée dans de nombreux pays, au premier rang desquels, la Bulgarie, la Hongrie, l'Autriche, l'U.R.S.S., le Canada,…

En Bulgarie, la méthode a été adoptée pour un programme d'enseignement des langues aux adultes et pour l'accélération de l'apprentissage chez l'enfant, dans les écoles publiques.

Elle a donné des résultats exceptionnels, permettant aux élèves d'apprendre, par exemple, l'italien en un mois. En 5 semaines, n'importe quelle personne désespérant de parler jamais l'anglais avec aisance peut apprendre et retenir 1800 mots et la grammaire de base, puis s'exprimer avec plaisir.

Le secret de cette méthode d'apprentissage repose sur un principe simple que d'autres cultures utilisaient déjà il y a plusieurs milliers d'années. Lorsque l'on se trouve dans un état de détente physique et mentale parfait, on peut enregistrer n'importe quel enseignement, associé à une certaine musique, et la retenir facilement.

Les principes de base de la méthode sont exposés page 5 en espéranto et sur notre site internet en français, à la page indiquée en fin d'article.

Sachant que l'espéranto est généralement considéré comme 10 fois plus facile que l'anglais, on voit sous un autre angle le «miracle» de la Pentecôte: il serait possible d'apprendre l'espéranto en moins de deux ou trois jours (et certains l'ont fait !).

Pour en savoir plus sur la suggestopédie, lisez l'ouvrage de Fanny SAFERIS «Une Révolution dans l'art d'apprendre» Robert LAFFONT (1984) ou consultez notre site internet à la page:
http://www.senlime.be/_sgg/m4m4s4_1.htm